

# Norvega Esperantisto

N-ro 5  
1993

3a periodo 60a (69a) jaro



ESPERANTOBLADET

Mapo de  
Norvegio laŭ  
Pasporta Servo  
1993.

~Cu estos pli  
da gastigantoj  
en la 1994-  
eldono??

**Atentu:** La limdato por  
(re-)aliĝo al Pasporta  
Servo estas la 1-a de  
decembro. Vd. p.21.

**Atentu:** La limdato por  
petskriboj al la legaco Uhlen  
estas la 1-a de decembro. Vd.  
p.20.

## El la enhavo:

~Cu Nordio aŭ Nordeno?	2
Novaĵoj el Estonio	5
Travivaĵoj kaj amikeco en ~Cinio	6
Junulara paĝo	8
Fervojista ofensivo en Hedmark	3-4 kaj 9
La instruista sekcio de NEL	9
Norvega kroniko	10
- Grupo Esperantista en STAVANGER	12-13
Malnovaj ekzamenaj taskoj	17
Legaco Uhlen	20
Etimologio	21



# Karaj legantoj!

Malfrua numero - ni bedaŭras. La kutima senkulpigo: manko de homfortoj. Sed fakte ni ĉi-foje lastmomente sukcesis trovi plurajn novajn helpantojn por la paĝomuntado. Tamen tian paĝomuntadon ni nun eble faris por unu el la lastaj fojoj. Estontece ni planas munti komputile.

Ni registris lastatempe kelkajn esprimojn de malkontento pri la aspekto de N.E. Ni ne scias ĉu ni - post tiom da rebatoj - aŭdacas ankoraŭfoje skribi, ke baldaŭ venos nova kaj pli altnivela komputila helpilaro. Sed fakte la estraro de NEL ĝuste nun faras seriozajn esplorojn pri novaĉeto.

La plej streĉa demando por la venonta tempo do estas: ĉu ni sukcesos sufiĉe fortiki nian ejon kontraŭ ĉstelitoj? Tiaĉa estas nia moderna civilizacio.

DD

# Ĉu Nordio aŭ Nordeno?

La redakcio ricevis reagon pri la diverĝa lingvouzado ĉi-gazete: Redakcie ni skribas "Nordio", dum i.a. nia prezidanto preferas "Nordeno". Pri tiu demando aperis du artikoloj en N.E. en 1989: En n-ro 1 Jan Sosniecki (Danio) pledis por "Nordeno", kaj en n-ro 3/4 Preben Bagger (ankaŭ li el Danio) respondis favore al "Nordio".

Sekve al la ĵusa reago ni levis la aferon en estrara kunsido de NEL. La estraro trovis, ke ne estas ĝia tasko normigi la lingvouzon tiurilate. Ankaŭ en aliaj kazoj vivadas du formoj paralele: ekz. landnomoj kun finaĵo -io/-ujo, kaj ankaŭ en la norvega: Syd-Afrika/Sør-Afrika. La uzado fine transvivigos unu el ili.

Tio ĉsajnas esti la provizora konkludo, kvankam la korespondado pludaŭras.

Ĉiukaze ni povas certigi al eventualaj konfuzitaj legantoj, ke la du terminoj plene samsignifas.

**PLENA ADRESO.** Sendante leteron al persono en nia oficejo en Oslo, bv. ne skribi nur ties nomon kaj "Olaf Schous vei 18" ktp., ĉcar tiam vi riskas ke eventuala nova poŝtisto ne scios en kiun leterkeston meti ĝin. Ĉiam zorgu, ke almenaŭ la vorto "Esperanto" aperu ie en la adreso.

La prezidanto:

# Ni ĉiam estu aktivaj!

Estas bedaŭrinda fakto ke ŝajnas neeble ke Esperanto estos instrufako en la Norvega Regna Radio (NRK) same kiel aliaj fremdaj lingvoj. La oficuloj simple ne volas agnoski la ekzistadon de Esperanto, sed ni ne perdu la kuraĝon! Ekzistas aliaj solvoj.

Vaste tra nia lando estas lokaj radioelsendejoj, kaj la

gvidantoj por tiuj ofte estas pli pozitivaj rilate al nia afero ol la ĉefoj en NRK.

Dum la landa kunveno de NEL estis proponite ke ni faru konkurson inter la esperanto-kluboj kaj cetere inter izole loĝantaj gesamideanoj en Norvegio: kiu atingos la plej bonan rezulton kiam temas varbadon de novaj adeptoj al nia afero dum la nuna labor-



## Norvega Esperantisto

ISSN 0029-361X

ESPERANTOBLADET

DUMONATA REVUO DE  
NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
NORSK ESPERANTO-FORBUND

ELDONEJO ESPERANTO A/S  
ESPERANTOFORLAGET A/S

Postgiro: 0803 5100300

Postgiro: 0809 5100318

Redaktis Douglas Draper.

Telefon: 22 35 08 94

Redakcio kaj ekspedejo:

Olaf Schous vei 18

N-0572 Oslo

Tlf. 22.35 08 94

Adresse: Olaf Schous v. 18, N-0572 OSLO 5

Kontortid: mandag, torsdag 15.30-16.30  
onsdag 14.30-15.30

Ĉefdelegito de UEA:

UEA-konto: espv-s

Kjell Gustavsen,

Rasmus Engers vei 10, 0956 OSLO 9

Postgiro 0808 5133293 Bankgiro 1609.08.5500.3

Jarabono (1994): 70 kr.

UEA-konto: norv-e

Presis: Gero-data, Lørenskog  
(ankaŭ n-ron 4/93).

Turisma Servo de NEL

ĉe Agnar Fitjar

Peranto por Svedio: SEF, ĉe

Lisbet Andreasson, Södra

Rörum pl 455, S-242 94 Hörby

5240 Valestrandsfossen

Tlf. 56 39 42 71

Postgiro 0809 5100326

E-poŝto: u\_draper\_d@kari.uio.no (ĉeestas marde/vendrede post la 12a)

periodo de NEL.

Oni faru la konkurson tiel ke ĝi poste montru en kiu el la gubernioj okazis la plej bona informado kies sekvo estos novaj membroj.

En la gubernio Hedmark oni faras jene:

Norvega Esperantista Fervojista Asocio (NEFA), kunlabore kun la Esperanto-klubo de Hamar, La Norda Stelo, turnis sin al la jenaj lokaj radioelsendejoj: Radio Hamar, Radio Hedmark en Elverum kaj al Solungen Bygderadio en Flisa. La programoj de tiuj tri elsendejoj atingas la plejparton de la ĉ. 185 000 enloĝantoj en la gubernio Hedmark, cetere ankaŭ multe pli vaste.

Ĉe la tri radioelsendejoj estas nun decidite dissendi la kurson de Jon Rømmesmo (vidu pri ĝi en N.E. n-ro 4/92, p. 12) en la sama takto en la tempointervalo 17h.45 - 18 h ĉiun lundon, kun ripeto samhore la sekvantan vendredon.

La kurso komenciĝis lundon la 1-an de Novembro (kun ripeto vendredon la 5an), kaj la fino estos lundon la 18an de Aprilo (kun ripeto vendredon la 22an) 1994, post interrompo dum kristnaska kaj novjara festoj kaj dum la pasko 1994.

Antaŭ la komenciĝo de la kurso okazos kiel eble plej okul- kaj orelfrapa informado

en la loka gazetaro, en la loka televido kaj kompreneble per la lokaj radioelsendoj. Oni konsilas ke interesitoj aĉetu la lernolibron de Jon Rømmesmo ĉe Per Johan Krogstie\*, kiu pretas akcepti la skribajn taskojn kaj korekti ilin.

Proverbo diras: "Kie volo, tie vojo."

La esperantistoj en la gubernio Hedmark nun optimisme antaŭvidas la estontecon, kaj ili admonas al la gesamideanoj en la tuta lando ke ili agu simile, ĉiu en sia gubernio.

Per Johan Krogstie

\* Karudveien 1, 2340 Løten

## Mortintoj

Dum la landa kunveno en Skjeberg ni honoris la memoron de la jenaj membroj kiuj mortis en la tempo post la antaŭa landa kunveno en 1991.

Elvin Edberg, Oslo  
Ivar Granmo, Hamar  
Sverre M. Halbo, Oslo  
Tom Arbo Høeg, Asker/Oslo  
Gustav Nilsen, Haugesund  
Mary Normann, Bodø  
Johan Rekve, Bergen  
Thorbjørn Smaadahl, Oslo  
Olav Thormodsen, Haugesund  
Erna Thorvaldsen, Asker/Oslo  
Margit Tøsdal, Bergen  
Elsa N. Værnor, Bergen

# Novaĵoj el Estonio

La 28an Aŭgusto Esperanto-Asocio de Estonio dum sia estrara kunveno akceptis la proponon restarigi la institucion ESPERANTO-INSTITUTO DE ESTONIO (E.I.E), kiu ekzistis ekde 1925 ĝis 1940, kiam komenciĝis okupacio. Poste ĝi ne funkciis, kvankam ne estis malpermesita.

Samideano Vjaceslav Hromov el Keila kuris laŭ diversaj ŝtataj instancoj kaj klopodis; ŝajnas ke nenie estas seriozaj obstakloj krom la manko de mono. Tamen la komenco estas farita kaj oni trapasis la Rubikonon.

S.ano Vjaceslav Hromov estas direktoro de E.I.E. Li informis ke oni nun atendas permeson por registrado ĉe la Ministerio.

Ni norvegaj esperantistoj nepre atentu la evoluon en nia najbara lando Estonio, cetere ankaŭ en la aliaj du ĉebaltamaraj statoj: Latvio kaj Litovio.

Ĝenerale la homoj tie sopiras al kontakto kun ni en Nordeno, sed vera obstaklo estas la lingva baro.

Devus esti nobla tasko por ni nun en niaj kluboj serĉi kontakton kun tieaj kluboj por interkorespondado kaj poste por reciprokaj vizitoj unu al la alia.

Ĝuste tie estas laŭ la ideo de la asocio FORENINGEN NORDEN = ASOCIO NORDENO.

Nun ni havas unikan ŝancon helpi al vasta kunlaboro en Nordeno helpe de Esperanto.

Per Johan Krogstie

---

## Mencio en radio au gazetoj

Ni memorigas:

Se vi aŭdas mencion pri Esperanto en radio aŭ televido, bonvolu sendi precizajn detalojn: dato, tempo, daŭro, enhavo, programuloj - al la komisiito pri radio Elna Matland, Fløenbakken 41 D, 5009 Bergen. Antaŭdankon!

Mencion de Esperanto en norvegaj gazetoj bv. raporti al la Gazetara Servo de NEL, ĉe Torstein Kvakland, Inge Krokanns vei 8, 7024 Trondheim.

### PA NORSK

Husk å rapportere radioprogrammer og avisartikler hvor esperanto nevnes, til de respektive ombudene!

# Travivaĵoj kaj amikeco en Ĉinio

Ni alvenis, mia edzino kaj mi, al la hotelo en Beijing unu septembran dimanĉon antaŭtagmeze. Posttagmeze mi telefonis al mia leteramiko Shang Juni, en Chengde, kvin horojn per trajno de Beijing, por sciigi ke ni estas en Beijing. Li diris ke li telefonos morgaŭ matene je la 9a. Sed jam je la 6a en la mateno li sidas en la hotelo kun biletoj por trajno je la 7a.

Veturi per ĉina trajno estas travivaĵo kaj malfacile. La trajnoj estas plenaj de homoj, kaj ni bezonas aĉeti biletojn antaŭe. En Chengde Shang helpis trovi bonan hotelkambron. La sekvantan tagon ni kune kun li vizitis la Imperiestran Somerpalacon kun granda ĝardeno, tri templojn, la grandan muron kaj multajn aliajn vidindaĵojn. En la vespero ni manĝis kun aliaj Esperanto-amikoj. La sekvantan tagon ni vizitis la universitaton - la Esperantan sekcion - kun interesa parolado de juna esperantistino. En la merkreda posttagmezo niaj amikoj akompanis nin al la trajno, kaj ni revenis al Beijing malfrue en la vespero kun memoroj de amikeco kaj

afableco de niaj Esperanto-amikoj en Chengde.

Ĉe "El Popola Ĉinio"

La sekvantan tagon ni veturis al la eldonejo de El Popola Ĉinio. Tie ni renkontis vicĉefredaktoron Zou Guoxiang, kaj parolis kun li kaj kun tradukisto kaj raportisto Wang Hanping (la redaktoro de la rubriko ESP-NOVAĴOJ). Poste ili invitis nin tagmanĝi en la redakcio de la eldonejo. En la posttagmezo ni vizitis la bestoĝardenon kun Wang kaj lia edzino, kiuj lasis sian laboron pro nia vizito.

Dimanĉon Wang kaj lia edzino venis al la hotelo je la 5.30 en la mateno. Kune kun ili ni veturis per trajno du kaj duonan horojn al la montaro. La loko en la montaro sentigis nin reportitaj multajn jardekojn en la pasinteco: La homoj rajdis sur ĉevaloj, kaj ni veturis sur ĉaro, kiun tiris azeno naŭ kilometrojn en la bela pejzaĝo. Ni grimpis sur la montoj kaj havis nekredeblajn naturotravivaĵojn.

Kune kun tiuj afablaj homoj

ni vizitis multajn ĝardenojn en Beijing. Ili lasis siajn laborojn por akompani nin. Kelkajn vesperojn ni manĝis en ilia loĝejo.

Niaj memoroj de Ĉinio estas neforgeseblaj, kaj iliaj afableco kaj amikeco nekredeblaj. Ni esperas renkonti tiujn ĉarmajn amikojn denove.

Ingemar Molin, Oslo

Intervjuon kun Ingemar Molin aperintan en la loka gazeto Nordstrands Blad, ni represigos en Esperanto-nytt n-ro 3.

- Red.

400.000 LERNINTOJ

En posta letero al ni, Wang Hanping informas ke 400.000 ĉinoj lernis Esperanton en la lastaj dek kvin jaroj, sed ke ne ĉiuj ankoraŭ aktivas.

---

## Kun infano al kurso en Jutlando

Dum la lasta semajnfino en oktobro mi kaj mia okjara filo vizitis Danlandon por partopreni Esperanto-kurson. Ni veturis per aviadilo rekte de Oslo al Århus, kaj per buso, trajno kaj plia buso ni atingis la kursejon en As Vig, sude de Horsens.

Dum la vespero venis ĉirkaŭ 50 personoj, kaj junaj kaj maljunaj, kaj ankaŭ sep infanoj inter tri kaj duona kaj dek kvin jaroj. Multaj el ili venadas ĉiun jaron, kelkaj por la sesa aŭ sepa fojo.

Post vespermanĝado ni aŭskultis pri la Esperanto-loĝkomunumo Bona Espero en Brazilo. Viro kaj virino loĝintaj tie sufiĉe longan tempon rakontis pri la tiea vivo, kaj nun ili kolektas vestaĵojn, ludilojn kaj alion, kaj sendas pakaĵojn al La Espero.

Dum la vespero ni kantis kaj popoldancis. Antaŭ ol enlitiĝi ni elektis grupon por la venonta tago. Estis grupoj por infanoj kaj por komencantoj, diskutgrupo, teatrogrupo kaj muzikgrupo. Ni partoprenis infan- kaj teatrogrupon, kaj en la vespero, post la festmanĝado infanoj kantis kaj la teatrogrupo ludis skeĉojn. En la ejo estis ankaŭ libroservo kaj du aŭ tri komputiloj: unu kun infanludoj, kaj la aliaj kun programoj en Esperanto.

Mi rerenkontis tie homojn el la Kultura Festivalo en Kopenhago, kiun mi partoprenis en aŭgusto. Estis tre hejmece. Mi kaj Jon estis la solaj norvegoj. Ili petis min venigi multajn pliajn norvegojn al la venontjara aranĝo, kiu okazos 14.-16. oktobro 1994 en As Vig.

May Andreassen

# JUNULARA PAGO

## Jarkunveno de NJE

Norvega Junularo Esperantista aranĝis jarkunvenon dum la Nordia Aŭtuna Renkontiĝo, kiu ĉi-jare okazis en Gausdal en laejo Kornhaug Fredssenter.

Nova estraro elektiĝis. Steinar Nilsen, Christian Moe kaj Anne Karin Bondhus lasis siajn estrarpostenojn al novaj membroj kaj mem eksiĝis kiel estraranoj, kaj Jon Arne Holm deziris transdoni la respondecon kiel kasisto. La novelektita estraro aspektas tiel:

Ulf Lunde, prezidanto (reelektita).

Jardar Eggesbø Abrahamsen,  
vicprezidanto (nova).

Knut Lyngstad, sekretario (nova).

Lars Sandbakk, kasisto (estis estrarano).

Ivo Leo Spira, landa redaktoro de  
"Kvinpinto" (reelektita).

Jon Arne Holm, estrarano (estis kasisto).

## Nordia Renkontiĝo

Dum la Nordia Aŭtuna Renkontiĝo reprezentantoj el Norvegio, Svedio kaj almenaŭ duone el Finnlando (Jepĉo) diskutis la estontecon por la junulara organo Kvinpinto. Oni decidis kontakti la estonan Esperantojunularon kaj proponi kunlaboron kun ili pri komuna gazeto. Ni jam ricevis unuan respondon de tie. La estonoj skribas, ke ili volonte kunlaboros, sed ke ili havas propran gazeton, nomatan "Norda Prismo". Ili petas unue kelkajn ekzemplerojn de nia Kvinpinto por komparo.

Al ĉiu NJE-membro (inter 60 kaj 70 ja pagas kotizon — kial tiom malmultaj estas aktivaj??) mi volas instigi, ke se vi ŝatas ĵurnalismen aŭ verkadon, bonvolu ne heziti: Kontaktu la landan Kvinpinto-redaktoron kun viaj ideoj! (Ivo Spira, Hellavn. 8, 3140 Borgheim. Tlf. 33 38 71 12)

## Ĉesu legi nur maljunul-gazetojn!

NJE kvar fojojn jare ricevas kelkajn ekstrajn ekzemplerojn de la internacia junulara gazeto *Tejo Tutmonde*. Se iuj inter niaj membroj deziras ricevi interesan, 36-paĝan A5-formatan Esperanto-gazeton senpage, bonvolu skribi aŭ telefoni kaj sciigu nin pri tio, kaj ni eksendados *TT* al vi! Ĝi estas belaspekta gazeto (sen koloroj), kiu diskutas aktualajn temojn. Ekzemple, en la lasta numero oni povis legi artikolojn pri:

la movado en Ĉinio,  
etnisma debato en TEJO,  
la "kataluna skandalo",  
ekstrema literaturemo inter esp-istoj,  
malakcepto de gejoj en la E-o-movado,

la muziko de Ĵomart kaj Nataŝa,  
rusa bardo kaj verkisto M. Bronŝtejn,  
pornaj fotoj sub la litoj(!),  
diversnivela lingvokursoj de Esperanto  
kaj de aliaj lingvoj,  
IJK en Vraca (Bulgario),  
KEF en Kopenhago (Danlando),  
MEJK en La Chaux-de-Fonds (Svislando),  
BEJK en San-Paŭlo (Brazilo),  
IS en Neumünster (Germanio),

kaj multe pli. *TT* estas bona gazeto por NJE-membroj, kiuj volas teni sin informataj pri la agadoj de la juna parto de la Esperanto-movado.

UL



# Fervojista ofensivo en Hedmark

Norvega Esperantista Fervojista Asocio - NEFA - sub gvidado de Rolf Bergh nun ellaboris grandiozan planon por disvastigi Esperanton inter la enloĝantaro en unu el la 20 gubernioj, kaj oni elektis tiucele Hedmark, meze en la suda parto de Norvegio, kiel eksperimentan regionon.

La homoj en Hedmark ekde lundo la 1a de Novembro 1993 ĝis vendredo la 22a de Aprilo 1994 povas sekvi kurson pri Esperanto por komencantoj per la loka radio ĉi tiel:

Radio Hamar: estas aŭdebla krom en la urbo Hamar ankaŭ ĉie sur la orienta flanko de lago Mjøsa.

Radio Hedmark, Elverum estas aŭdebla en la valo Østerdalen kaj en Trysil.

Solungen Bygderadio, Flisa estas aŭdebla en la regionoj plej sude en la gubernio Hedmark.

Ĉiuj el la menciitaj elsendejoj disaŭdigos la 18-lectionan kurson por komencantoj ellaboritan de Jon Rømmesmo, adaptitan kaj prilaboritan de la geedzoj Miriam kaj Rolf Bergh.

Tiuj lecionoj sendiĝas samtempe de ĉiuj tri elsendejoj, nome h. 17.45 - 18.00 dum ĉiu lundo, kun ripeto ĉiun vendredon en la sama semajno.

Ni nun forte esperu ke tiu plano bone sukcesos, kaj ke ĝia rezulto estos novaj freŝaj fortoj al nia movado.

La ekzemploj de NEFA havu infektefikon al niaj gesamideanoj en la ceteraj gubernioj en nia vasta lando!

PJK

## **PÅ NORSK:**

NSB Esperantoforbund har bearbejdet Jon Rømmesmos radiokurs, og sørget for at den blir sendt fra tre radiostasjoner i Hedmark fra november til april. Dette er et ledd i en større plan for utbredelse av Esperanto i Hedmark fylke.

---

## La instruista sekcio de NEL

Post dujara periodo sen estraro aŭ komisiito, nia nova NEL-estrarano Bjørn Thuv nun transprenas la administradon de la sekcio kaj la rilatojn

kun ILEI (la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). Lia adreso: Årøyveien 33, 3135 Torød. Tlf. 333 84348.

# Norvega kroniko

## BERGEN

La klubo raportas ke ilia nova ekspozicio (kiun ili aĉetis el la profito de la UK en 1991) staris en la studenta centro kaj en pluraj lokaj bibliotekoj norde de Bergen. Ili kutimas ankaŭ provi aranĝi informbudojn proksime de la biblioteko.

En Åsane ili partoprenis en kunlabora informagado de diversaj organizoj direktata al la loka junularo. Helpis tri mezlernejoj ĉe informbudo en subtegmenta butikaro.

La klubo eldonadas membran bultenon kaj informpetantoj ricevas ampleksan pakaĵon da informoj pri la lingvo kaj la aktivado.

Okazas ankaŭ intensiva semajnfina kurso kaj studrondo. Gvidas ilin Anne Karin Bondhus.

La klubo kunvenis la 18an de oktobro en la kutima ejo Bydelshuset-Møhlenpris. Ĉefprogramulo estis nia islanda samideano Kristján Eiríksson, nuntempe laboranta ĉe la universitato en Bergen. Li priparolis karakterizajn trajtojn ĉe la islanda lingvo. Temo kiu tre interesis al ni, kaj certe al ĉiuj esperantistoj. Li ankaŭ pretigis por ni "materialon",

tiel ke ni bone povis sekvilian paroladon.

Cetere la estraro prezentis novaĵojn pri informa agado i.a. en bibliotekoj kaj butikaroj.

Gasto en la kunveno estis Henryk Wenzel el Berlino. Ĉiam inspiras tiaj "fremdaj" elementoj.

La kunveno tre agrable pasis, kaj ni jam antaŭĝojas al la venonta la 15an de novembro. Intertempe ni havos la kafejan renkontiĝon la unuan lundon en ĉiu monato.

Raportis Elna Matland.

## HAMAR

La prezidanto de Esperanto-klubo La Norda Stelo, Hamar iĝis 70-jara la 23an de septembro 1993.

La jubileanto estis fervojisto ekde jaro 1941, kaj lia meritlisto, kaj en la deĵora medio kaj en la politiko estas grandioza.

Fine li fariĝis urbestro de Hamar, kaj li ĉiam montris entuziasmon por sia kara urbo sur la suna bordo de lago Mjøsa.

Kiam la Internacia Esperantista Fervojista Federacio IFEF decidis aranĝi sian 42an kongreson en Hamar dum jaro 1990, la loka kongresa

komitato ekde la komenco de la preparlaboro serĉis kontakton kun la urbestro kun peto ke li plenumu diversajn dezirojn, kaj tiu kontakto vere iĝis fruktodona.

La urbestro tuj ekinteresiĝis pri Esperanto, jes li tiel fervore entuziasmiĝis pri la afero ke li decidis salutparoli dum la diversaj okazintaĵoj en Esperanto, kaj tiel li pli kaj pli glitis en nia medion.

Danke al lia persona influo, Hamar dum la kongreso inaŭguris straton kies nomo estas Esperantogata (= la Esperantostrato), kaj la propagand-efiko de tiu agado estas klarvidebla.

La klubo poste kreskis kaj floras, kaj ĝi nun estas inter la plej aktivaj en Norvegio.

Multflanke nia kara amiko Egil sukcesis igi Hamar "la verda urbo ĉe lago Mjøsa", kaj ni liaj geamikoj sincere salutas kaj gratulas nian aktivan kaj tre afablan kluban prezidanton.

Per Johan Krogstie

## **MARA VENTO HAUGESUND**

Ni kunvenis la 30an de septembro en la KM-domo.

La prezidanto Steffen Kjetland malfermis la kunvenon, kaj li precipe bonvenigis

nian gaston Elna Matland.

Post kantado kaj kaftrinkado Elna Matland interese raportis pri la UEA-mondkongreso en Valencia. La raporto klare montris ke Esperanto bone kaj vigle vivas. Post du jaroj la mondkongreso okazos en Finnlando, kaj sendube kelkaj MaraVent-anoj iros tien.

Alian raporton prezentis nia kasistino Ingrid Moen. Ŝi vizitis Esperanto-kongreson en Latvio, ŝia amikino tie invitis ŝin. Ingrid montris belajn bildojn pri la vizito tie, kaj ŝi ankaŭ transdonis donacon al nia klubo de la esperantoklubo en Riga. La donaco estas la emblemo de la Riga-klubo kiu cetere havas nun pli ol 100 jarojn.

## **OSLO**

La 2an de novembro.

Kjell Peder Hoff bonvenigis, speciale al Marianne Lund kiu faris la programon en ĉi tiu kunveno.

Dum unu jaro ŝi deĵoris kiel tradukisto en la norvega ambasadejo en Moskvo. Ŝi travivis la ribelon en Moskvo, la batal(et)o pri la parlamento, "La blanka domo", ŝi eĉ loĝis tute proksime al ĝi. Pri ĉi tiu okazaĵo ŝi rakontis, kaj ŝi informis pri la ĉiutaga vivo ĝenerale en la urbo - pri la vivkondiĉo de la enloĝant-

oj. Funkcias en Moskvo nuntempe unu Esperanto-klubo - en kiu ĉsi sukcesis membriĝi.

## SAUDA

La unua kunveno aŭtuna estis dediĉita al la 78a mondkongreso en Valencia. Reidun Birkeli (Sunfloro), la prezidantino de la klubo, tre interese rakontis pri siaj impresoj dum la kongresaj tagoj. Ĉsi ankaŭ montris bildojn kaj memorigajn objektojn kunportitajn de la kongresurbo.

Sed kiel konkludon ĉsi trovis ke la kongreso en Bergen estis eĉ pli altranga.

La vespera gastiganto Lilli Birkeli (la vidvino de Norman) invitis al agrabla kafopaŭzo.

Poste Olav Andersen gvidis lingvajn ekzercojn. La geanoj ricevis la lingvajn taskojn antaŭ semajno por ke ili prilaboru ilin hejme.

Fine ni pritraktis kelkajn klubajn aferojn.

O.A.

## STAVANGER

En aŭto survoje de Bryne al Stavanger naskiĝis ideo. Kvar monatojn poste, la 27an de januaro 1993, en eta kuirejo en Opheimsgata 63, Stavanger, naskiĝis la Grupo

Esperantista en Stavanger (GES) (vd. N.E. 3/93, p.23) La kvar akuĉsistoj kunvenis monate ĉgis la somero. Poste multo okazis.

La kvar aŭtunajn kunvenojn (ĉgis la 15a de oktobro) vizitis entute 12 personoj, inter 21- kaj 70-jaraj. GES nun kunvenas dusemajne en Midjord Bydelshus, kie ni senpage luas ĉcambron.

Pluraj el la novaj membroj neniam lernis la lingvon. Tial la grupo nun funkcias kiel studrondo. Kune ni studas la lernolibron "Tra la mondo" de Falck/Rosbach. La progreso de la komencantoj vere impresas. Skribante ĉcition kaj sciiĝinte pri la aktivado en Vadsø, mi kredas ke NEL devas presi pliajn lernolibrojn...

Jam dufoje GES akceptis eksterlandajn vizitantojn. Unue Ludmila Valková el Slovakio, kaj poste la rusojn Andrej Miĉhajlov kaj Vladimir Jefimov en la sekvinta kunveno.

## Kresko

La kreskon de la grupo ĉcefe kaŭzas letera kaj telefona varbado de la oficejo en Oslo. Tiu varbado ankaŭ montris ke pluraj interesuloj bedaŭrinde ne povas partopreni grupon pro laboro, studoj ktp. (Ĉsajne malnovaĉjo por anoj de la E-

movado!) Montriĝis ke GES vere ne naskiĝis tro frue.

Krome, ni anoncis en urbo-parta gazeto, Bydelsavisa for Storhaug (senpage, ĉar ni senpage luas kunvenejon - logike, ĉu ne?). La anonco donis novan aninon. La 16an de septembro ni anoncis, ankaŭ senpage (!), en la loka televido, TV-Vest. Malfeliĉe neniu respondis la anoncon.

Grupo Esperantista en Stavanger ne estas oficiala klubo aliĝinta al NEL. La

afero tamen estas diskutata, kaj ni decidis atendi ĝis 1994 ĉar ni volas vidi ĉu la grupo vivindas. Ni ankaŭ eklaboros pri statuto ktp.

Informpetantoj povas turni sin al Kjell Heggvold Ullestad, Opheimsgt. 6, 4012 Stavanger (tlf. 51 52 79 39)

KHU

## TROMSØ

La Norda Lumo raportas pri kurso kun 13-14 partoprenantoj.

---

# Aranĝoj en eksterlando

(Pliaj detaloj en nia oficejo.)

Printempa Semajno Internacia. Precipe por familioj, sed ankaŭ unuopuloj estas bonvenaj! Precipe por E-parolantoj, sed ankaŭ komencantoj estas bonvenaj!. Jünkerath, Eiffel, Germanio (tuj apud la landlimo al Belgio kaj Luksemburgio), 1.-9. de aprilo (paske) 1994.

Kaunas, Litovio: Zamenhofaj tagoj. 11.-12. decembro. Solena inaŭguro de Esperantodomo - la iama domo de Aleksandro Zilbernik, bopatro de Ludoviko Zamenhof. Jar-kongreso de Litova Esperanto-

Asocio kun riĉa kultura programo kaj kursoj. Eksterlandaj gastoj povos veni kelkajn tagojn pli frue kaj resti kelkajn tagojn post la aranĝo (6. - 17. de dec.) Oni aranĝas specialan kulturan programon por ili.

Tampere, Finnlando: Internacia Esperanto-semajno 27.6 - 1.7.1994.

UK 1994 EN SEULO  
La Universala Kongreso okazos venontjare en Seulo en Suda Koreio 23.-30. julio. Aliĝiloj haveblas en nia oficejo.

# La Esperanto-monumento en Narvik

En 1934 la Universala Kongreso de Esperanto okazis en Stokholmo, kaj al la aranĝo apartenis i.a. postkongresa ekskurso al Narvik, kun 125 partoprenantoj el 15 landoj. Post vizitoj al diversaj vidindaĵoj kaj ekskurseto sur la fjordo, oni tagmanĝis en restoracio Fjellheim sur la Fagernes-monteto. Proksime al la restoracio estis starigita memorŝtono. Post la tagmanĝo ĝin solene senvualigis generalo Bastien, la tiama prezidanto de U.E.A., interpretante la grandan valoron, kiun havis la ideo pri starigo de ĉi tiu memorŝtono. Sekvis ankaŭ pliaj paroladoj kaj porokaze verkita poemo.

Kiam nun la germano Hugo Röllinger kolektas informojn pri ĉiuj Zamenhof- kaj Esperanto-monumentoj en la mondo por eldoni grandan verkon pri ili, kaj petis min havigi pliajn informojn pri la memorŝtono en Narvik, mi membris, ke mi aŭdis, ke ĝi estis malaperinta, sed retrovita antaŭ pluraj jaroj. Ĉar nun ne estas Esperanto-klubo en Narvik, mi telefonis al Rolf Holm en Tromsø. Li povis rakonti, ke dum la dua mondmilito, dum bombardado de

Narvik, bombo falis apud la memorŝtono, kiu ĵetiĝis malproksimen kaj rompiĝis en du pecojn. En 1983 fervojistoj hazarde trovis ĝin, sed ne komprenante la lingvon sur la ŝtono, ili turnis sin al la universitato en Tromsø, kie Rolf Holm informiĝis. Li veturis al Narvik kaj povis identigi la ŝtonon. Oni nun metis ĝin en la parkon apud la stacidomo. Mi opinias, ke ni devos nun ripari tiun plej norde situantan Esperanto-monumenton en la mondo kaj restarigi ĝin. La teksto sur la ŝtono kiu estas daŭre legebla, estas la jena:

## ESPERANTO

Ankaŭ al tiu-ĉi  
mondangulo atingis kaj venkis  
la helplingvo  
inter la popoloj.  
Starigita la 16. Aŭgusto 1934  
en ĉeesto  
de esperantistoj el 15 nacioj.

Rolf Holm promesis, kiam la neĝo malaperos\*, reiri al Narvik por fotografi la memorŝtonon por la verko de s-ro Röllinger.

C. Støp-Bowitz

---

\* Ni ricevis la manuskripton ĉi-printempe - Red.

Ordinare oni ne citu sin mem. Sed relegante tion, kion mi skribis antaŭ 10 jaroj pri CSB, mi permesas al mi ripetition. Ĉar mi ne povas diri tion pli bone!

Oni havas la impreson, ke la nomo de C. Støp-Bowitz ĉiam ekzistis en esperantistaj medioj, kaj ne nur en Oslo, ne nur en Norvegujo, sed en la tuta mondo. Iam ankaŭ li devas atingi la aĝon de ekŝigo el ordinara laboro. Tion ni povas nur bedaŭri. Ĉar C. Støp-Bowitz ne estas nur homo, kaj certe ne ordinara homo, li vere estas institucio. Neniu faris tion por Esperanto en Norvegujo - kaj lia laboro estas nepre ĉia: verkado de sciencaj artikoloj, sed ja ankaŭ temporaba kartotek-ordigado kaj respondado al leteroj de kiu ajn, kiu montras la plej etan intereson pri Esperanto. Lia sindono estas senfina, kaj ni kaptas la okazon danki, ĉe ĉi tiu stacio en lia vivo, danki serioze kaj solene al tiu efektive tre modesta persono, tiu ĉercemulo, kiun alte aprecas liaj studentoj (kion mi persone havis la

okazon konstati), kaj kiun alte ĉatas kaj respektas liaj amikoj kaj kunlaborantoj.

Kvankam la agado de Støp-Bowitz iomete normaliĝis la lastajn jarojn - sed ja nur iomete - lia fervoro kaj lia flamo restas la samaj. Li daŭre estas ĉefo de la Eldonejo, li partoprenas lokajn, landajn kaj interaciajn kunvenojn kaj ĉie parolas kun la samaj konataj scio kaj prudento. Li eĉ fariĝis - post la jubileo antaŭ dek jaroj - profesoro, kaj tio en San Marino, kie li ĉiujare prelegis en ties internacia universitato.

Cetere li neniam ĉesis labori pri siaj amataj bestetoj, kaj antaŭ mallonga tempo finis grandan sciencan laboron. Ĝis la lasta jaro li ankaŭ estris la ekzamenon pri botanika kaj zoologia nomenklaturado. Ĉe la Universitato en Oslo, kaj mi havis - kiel lia cenzuristo - la okazon konstati, kiel zorge kaj adekvate li plenumas tion, kaj samtempe mi havas proksiman sperton pri la fakto, ke li, en sia relative alta aĝo, estas alte ĉatata kaj estimata de siaj student-

oj, kiuj rigardas lin sia amiko.

Mi trovas tre grave substreki ĉi tion, same grave kiel la ordinaran liston pri meritoj. La listo de meritoj estas pli longa por Carl ol por iu alia norvega esperantisto en la historio. Lia nomo estas tiu, kiu en la tuta mondo signifas "Esperanto en Norvegujo".

Ni mallonge notu, ke li estas esperantisto de 1928, prezidanto de NEL 1947 dum tre multaj jaroj, membro de la Akademio, prezidanto de la Ekzamena Komisiono kaj de la Eldonejo, verkinto pri la historio pri la Esperantomovado, kies novan eldonon ni sopiras, kaj - kune kun Setälä kaj Vilborg - de la gramatika studo "Esperanto - moderna lingvo", ĉefkunlaboranto pri zoologio en

PIV, Majstro de la ordeno "Pro Merito", kursgvidanto, kluba prezidanto, preleganto en ISO, gvidanto de la Lerneja Kampanjo en Norvegujo, prezidanto de ISAE, prezidanto de la UK en Oslo 1952, partoprenanto en ĉ 30 Universalaj Kongresoj.

Samtempe li havis tempon por vojaĝi - al Japanujo, al Aŭstralio, al Sud-Ameriko. Kaj tempon por esti - dum almenaŭ 30 jaroj - la ĉiam ĉeestanta persono en la oficejo de NEL, kie li konis ĉiun detalon. Cetere li ankaŭ estas sciencisto - tre efika kaj tre profunda - kaj universitata instruisto. Kaj bona amiko kun bona humoro.

Kara amiko, en la nomo de ĉiuj norvegaj esperantistoj: Koran gratulon!

Johan Hammond Rosbach

**La plej ofta...**

# **Eventoj**

**Internacia movada gazeto por aktivaj esperantistoj!  
Aperas dusemajne, legata en pli ol 40 landoj...**

**Petu senpagan provekzempleron:**

**EVENTOJ, pk. 87. H-1675 Budapest, Hungario**



# Malnovaj ekzamenaj taskoj

Por montri al ekzameniĝontoj kiom (mal?)facilaj estas la ekzamenaj taskoj, ni jen aperigas kelkajn de la lastaj jaroj. Vi rajtas sendi viajn solvojn al loka ekzamena komisiono por kontrolo (vd. adr. en N.E. n-ro 2/93, p.27).

Pli fruaj taskoj aperis en N.E. 5/85, p.4 (supera kaj elementa), kaj en numero 2/1990, p.24 (elementa).

## Elementa ekzameno en Hamar Majo 1991.

Diktaĵo:

Trafa rekompenco (1)

Vizonino (2) mortis / kaj iris al la ĉielo. / Kiam ŝi alvenis, / ŝi frapis la pordegon. / Sankta Petro demandis, / kion ŝi volas. /

"Ĉu vi bonvolus / enlasi min?" / diris la vizonino. / Sankta Petro ridetis, / larĝe malfermis la pordegon / kaj petis ŝin eniri. /

"Dum via vivo sur la tero / vi estis tre bonkora / kaj pia (3) vizonino," / li diris. / "Pro tio vi meritas premion. / Kion vi ŝatus ricevi / kiel rekompencon / por via bona vivo?" /

Dum momento / la vizonino pripensis / taŭgan respondon / al la propono / de Sankta

Petro. / Fine ŝi diris: / "Mi dezirus iun vestaĵon. / Ekzemple vi povus donaci al mi / pelt-mantelon el haŭto / de film-aktorino."

- (1) rekompenco: belønning.
- (2) vizonino: vizonino: mink.
- (3) pia: from.

Tradukaĵo:

En uforglemmelig opplevelse

I 1959 (1) feiret esperantister over hele verden 100-årsjubileet (1) for fødselen til dr. Zamenhof, som skapte Esperanto. Jubileet kulminerte med Esperanto-kongressen Warszawa (2). 3265 (1) personer fra mer enn 40 (1) land besøkte kongressen, og én av dem var jeg.

Det var min første Esperanto-kongress og også min første reise utenfor Skandinavia. Cirka 20 (1) nordmenn reiste dit med tog. Før kongressen stanset vi to dager i Berlin (3). Da delte ingen mur byen, og vi besøkte både Øst-Berlin og Vest-Berlin.

Men den uforglemmelige opplevelsen var kongressen selv. Overalt hørte jeg det samme språket, og jeg forsto det! For første gang kunne jeg snakke med mennesker fra hele verden uten vanskeligheter. Jeg vet at mange som deltar i et internasjonalt Esperanto-arrangement for første gang, har lignende opplevelser.

- (1) Skriv tallene med bokstaver.
- (2) Warszawa: Varsovio.
- (3) Berlin: Berlino.

### Elementa ekzameno en Trondhejmo Decembro 1992

Diktaĵo:

Lerta vendisto

Estro de butiko de vestaĵoj anoncis, / ke li serĉas vendiston. / Multaj petantoj prezentis sin, / sed al ĉiuj la estro diris: / "Mi bezonas lertan vendiston. / Se vi ĝis morgaŭ sukcesos vendi / ĉi tiun malbelan, / rozkoloran kostumon, / mi dungos vin." /

Kiam la petantoj aŭdis tion, / preskaŭ ĉiuj rezignis. /

Sed unu viro diris: / "Mi volas provi. / Donu al mi la kostumon!" /

La postan tagon / li revenis al la butikestro / kaj diris: / "Mi vendis la kostumon, / Jen la mono!" / La estro mire demandis: / "Sed ĉu la kliento / ne malŝatis la kostumon?" / "Ne," respondis la viro, / "la kliento diris nenion, / sed lia gvidhundo forte grumblis!".

dungi: ansette

gvidhundo: førerhund

grumbli: knurre

Tradukaĵo:

Indianerkvinne får Nobelpris

For 500 (1) år siden kom Columbus (2) til Amerika. Man har feiret dette jubileet i hele verden, men ikke alle er enige i at det er verd å feire. Mange indianere betrakter "oppgagelsen" av Amerika som en ulykke. De foretrekker å snakke om 500 (1) år av undertrykkelse og motstand.

En av dem som arbeider for indianernes frigjøring, er Rigoberta Menchu fra Guatemala (3). 10. (1) desember i år kommer hun til Oslo for å motta Nobels fredspris. Mange roser Nobel-komiteén fordi de nettopp i år valgte å gi henne prisen. Det er en aner-

kjennelse av urbefolkningenes  
(4) rettigheter, sier de. Og-  
så samene (5) i Norge feirer  
tildelingen av Nobels freds-  
pris til Rigoberta Menchu.

(1) Alle tall skrives med  
bokstaver

(2) Columbus: Kolumbo

(3) Guatemala: Gvatemalo

(4) urbefolkning:  
indiĝena popolo

(5) same: sameo.

Elementa ekzameno en Oslo  
Junio 1993

Diktaĵo:

Pastro kutimis skribi /  
ĉiun vorton / de sia prediko.  
/ En la dimanĉoj / li staris  
legante / el sia skribaĵo /  
ne levante la okulojn / for  
de la paperoj. / Unu kuraĝulo  
/ el la paroĥanaro / ek-  
deziris / iom provoki la  
pastron. / La viro vizitis la  
pupitron / antaŭ la diservo,  
/ tie kuŝis jam la  
manuskripto, / kaj la viro  
forprenis / ĝian lastan  
folion. /

Temo por tiu prediko /  
estis la pekofalo / de Adam  
kaj Eva. / La pastro legadis  
/ ĝis la lasta frazo / de la  
antaŭlasta folio, / ĝi son-  
is: / kaj tiam Adam diris al  
Eva ... / Sed nun li ne povis  
/ trovi la daŭrigon. / Li  
komencis tremi / kaj ripetis:

/ kaj tiam Adam diris al Eva  
... / sed ne trovante / la  
ĝustajn vortojn / li diris:  
/ "Ŝajnas ke ĉi tie / mankas  
folio".

paroĥo: menighet  
pupitro: prekestol.

Tradukaĵo:

Før og under den siste ver-  
denskrigen forbød og forfulg-  
te flere av diktaturlandene  
Esperanto-bevegelsen. Her i  
vårt land innstillet vi all  
offentlig informering og virk-  
somhet for Esperanto, men vi  
gikk under jorden og fort-  
satte mange steder våre møter  
i hemmelighet. Undervisning  
både for begynnere og videre-  
komne foregikk i private hjem.

I dag har Esperanto-beve-  
gelsen nådd hele verden, og  
vi arbeider for å få inter-  
nasjonale organisasjoner til  
å anerkjenne Esperanto og ta  
det i bruk. Våre årlige ver-  
denskongresser for Esperanto  
samlar flere tusen deltagere  
fra 60-70 land, og alle  
bruker bare Esperanto. Andre  
internasjonale møter og kon-  
gresser må bruke millioner av  
kroner på oversettelser. Vi  
forstår hverandre alle sammen  
bare ved hjelp av Esperanto.

innstille: ĉesigi  
60-70: skriv tallene med  
bokstaver.

## ROLF UHLENS LEGAT

### Til fremme av Esperantobevegelsen i Norge

#### TILDELING AV BEVILGNING 1994

Ifølge statuttene for legatet kan Norsk Esperanto-forbund, NSB-Esperantoforbund og eventuelle andre esperantoor-  
ganisasjoner og ethvert medlem av disse søke om bidrag  
"til fremme av Esperantobevegelsen i Norge".

Søknadsfristen er 1. desember. Søknadsblanketter og  
opplysninger kan en få ved å skrive eller ringe til:

**Rolf Uhlen's Legat v/ styreformann Harald Rygg,  
Magnefaret 15 F, 0678 Oslo. Telefon: 22 19 75 80**

Søknadsblanketter kan også fås på kontoret.

La nuna malaltiĝo de la rentumprocento por niaj kontoj en la banko kaŭzas, ke la sumo disponebla por elpago de asignoj en 1994 preskaŭ duoniĝos. Ni rememorigas ĉiujn petskribontojn pri tio, admonante pri prudenta ago tiurilate.

R.B. (kasisto)

#### Infanlibroj:

### Tradukontoj serĉataj

Ekde 1991 la germana eldonejo Grete Häusler eldonas la infanlibroserion "La raŭpo Augustin" de Thomas Busse. Estas planataj 24 libroj. Tiuj pedagogie valoraj libroj, kiuj celas infanojn de 3 ĝis 8 jaroj, aperu ankaŭ en aliaj lingvoj, kun Esperanto

kiel pontlingvo. La eldonejo konsistas el nepagatoj, celante eldoni librojn kun pozitivaj enhavoj. Nun ĝi serĉas homojn, kiuj pretas senpage traduki. Kontakto: Detlef Meier, Marktplatz 8, D-63065 Offenbach, Germanio.

# Poŝtmarkoj

(represe el N.E. 1-90)

Norvega Esperantisto ricevas de tempo al tempo uzitajn poŝtmarkojn de niaj legantoj. Koran dankon. Kelkajn poŝtmarkojn ni sukcesas monigi, kaj la mono kovras parton de la afrankaj elspezoj de nia gazeto.

La aliaj poŝtmarkoj, ne monigeblaj, troviĝas en vendalbumoj kaj en kovertoj. Se vi kolektas, aŭ se vi havas

infanojn aŭ nepojn, vi povas aĉeti poŝtmarkojn ĉe ni. Ni havas grandan stokon de belegaj arabaj poŝtmarkoj, kiuj estas tre malmultekostaj (po kr. 0,50 + afranko kompreneble). Cetere pakaĵetojn, kovertojn, kun 100 aŭ 200 diversaj poŝtmarkoj. Utiligu la okazon, apogu vian gazeton!

Johan Hammond Rosbach,  
Huldervn. 17B, 1709 Sarpsborg.

---

## ForUM - for utvikling og miljø

Tiu kunlabora forumo pluiras en la spuroj de la antaŭa "Komuna Kampanjo", kaj ili sendadas al ni multajn raportojn kaj informojn pri

siaj aranĝoj. La estraro de NEL decidis peti formalan pasivan aliĝon, kaj nomis Bjørn Thuv kiel kontaktulon.

---

## Unuekzemplere ricevita

Esperantaj sinonimoj. Jaan Ojalo. UEA kaj Fundación Esperanto. Dua korektita eldono. 1993. 96 p.

---

## Pasporta Servo

Praktiku vian Esperanton kun eksterlandanoj sen vojaĝelspezoj! Aliĝu al Pasporta Servo. Formularo haveblas en nia oficejo. Estas ankoraŭ nur kvar adresoj en la tuta Norvegio! Limdato la 1-a de decembro. (Kaj vi ĉiam rajtas diri al vizitonto ke ne konvenas.)

Etimologio:

# Vermiljono kaj vermuto

Eble vi ne konas la vorton vermiljono. Ni helpu vin: vermiljono estas la cinabra koloro. vermuto ĝenerale estas pli konata, ĝi estas blanka vino kun aldonaĵo de sukroj el amaraj plantoj.

Vi certe divenis, ke ni apudigis la du vortojn pro la komuna unua silabo ver. Se vi tiel divenis, vi estas prava. Kaj se vi konas iomete la francan lingvon, vi scias, ke ver signifas "vermo, larvo". En la latina ĝi estas vermis, en la germana Wurm, en la angla worm. La hind-eŭropa praformo estas \*vrmo, kiu signifas "tiu, kiu tordiĝas". Tial ankaŭ la germana Wurst (=kolbaso) estas parenca vorto.

Vermuto estas Artemisia absinthium. Artemizio estas herbo aŭ arbusto, kies eltiraĵon oni uzis kiel antidoton por serpenta mordo. La absinton la angloj ja nomas wormwood.

Kion do pri vermiljono? La vorto devenas de la franca vermeil, kiu siavice originas el la latina vermiculus = vermeto. Tio eble ne surprizas, oni ja scias, ke la ruĝa

kolorsubstanco koĉenilo estas ekstraktita el la koĉco, kiu estas insekto troviĝanta kaj en Meksikio kaj sur Kanariaj Insuloj, kaj ke purpuro estas kolorilo, kiun oni antumil jaroj eltiris el konkoj.

Sed la latina vermiculus donis ankaŭ la nomon al la maldikegaj pastaĵoj, kiujn ni konas kiel vermicelojn.

Do - se vi manĝas vienajn kolbasojn (Wienerwurst) kun vermiceloj kaj al tio trinkas vermuton, ni esperu, ke vi ne estas vermotrua aŭ eĉ vermoforma.

JHR



Sablovermo, arenikolo

En la vendobreto:

# La Sarajeva sieĝo

La plej nova libro en la vendobreto de la Eldonejo estas, en la vortoj de unu el la eldonintoj, "tute aparta libro, ĉar laŭ mia scio ĝi estas la unua atestaĵo de iu, kiu mem vivas kaj plu vivas en Sarajevo".

La redaktoro de la Sarajeva gazeto Oslobodjenje (=liberigo) faksis ĉiutage raporton el la sieĝata urbo al kroata gazeto Slobodna Dalmacija. La francigitajn tekstojn esperantigis kaj redaktis Lo Jacomo, kaj la eldonon financis István Ertl, Mark Fettes kaj Ĵak le Puil. Intervjuo kiun faris Pola Radio kun István Ertl pri ĝi aperis frontpaĝe de Eventoj n-ro 39.

Cite el la recenzo de Stefan

Maul en la oktobra numero de revuo Esperanto: [La aŭtoro] Dizdarevic sen ia ajn dubo estas lerta ĵurnalisto, kiu scias kiel komuniki verojn kaj mesaĝojn: oni devas celi al la koro kaj animo de la legantoj. Li malmulte komentis, foje eĉ ne klarigas, ofte demandas, jen kaj jen rezonas. Sed plej ofte li "nur" rakontas, priskribas, notas. Ĝuste ĉi tiuj partoj de lia taglibro estas la plej fortaj kaj trafaj: ni, legante inter la linioj, ekkonas kaj eble ekkomprenas la teruran kaj ĉsokan veron pri kruelega milito."

Zlatko Dizdarevic: Rakontoj pri Sarajeva sieĝo 80 p. 24 cm. 95 kr.

## No kryp Dag og Tid ut av sitt gode skinn

Dag og Tid – verdas einaste riksdekkjande nynorskavis – har kledd seg i nytt format og ny form.

Men vi skal framleis vere den uavhengige og uredde avisa som tør å tale Akersgata midt i mot.

Kulturelt mangfald, store liner, pikante detaljar.

Frisk frå kjelda, kvar torsdag.

Kan sendast  
ufrankert  
i Norge.  
Dag og Tid  
vil betale  
portoen.

Svarsendings-  
Avtalnr. 120000/120omb  
Relisnr. 1 30000

Dag og Tid  
Sentrum  
0109 Oslo

**Ja** eg ønskjer å tinge Dag og Tid  
 ½ års abonnement kr 420,-  
 ¼ års abonnement kr 225,-

Namn: .....

Adr.: .....

Postnr: .....

Poststad: .....

Tlf.: .....

Du kan òg fakse til 22 41 42 10  
eller ringje 22 11 14 55

(inter\_san\_ga anonco)

## La belajn turismajn libretojn

- kiujn ni eldonis okaze de la UK en Bergen - vi povas daŭre aĉeti ĉe la klubo de Bergen. Prezo kr. 20. Bela donaco al vi mem aŭ al viaj eksterlandaj amikoj. Vendeblas ankaŭ la bildkartoj

kun ĉarmaj motivoj je la prezo de 2 kr. Aŭfranko aldoniĝu! Vi povas mendi telefone ĉe Elna Matland (55 29 34 53) aŭ ĉe Agnar Fitjar (56 39 42 71).

E.M.

## Ne nur sur viaj kovertoj

sed ankaŭ sur viaj tekoj, valizoj, poŝskalendaro, monujo ... vi gluu ĉi tiajn markojn (verdkolorajn). Tiel vi montras al viaj apuduloj ke Esperanto ne formortis, kaj ke ankaŭ vi uzadas ĝin. Aĉetu de Klubo Esperantista en Oslo: 10 kr. por folio kun 9 markoj. Rabataj prezoj: ekde 10 .: po 8 kr., ekde 20 po 7, ekde 30 po 6, ekde 50 po 5 kr. Poŝtĝirokonto 0805 515 77.



### PÅ NORSK

Bestill disse grønne klistremerkene til veskene, mappene og lommeboken din - fra E-klubben i Oslo. 10 kr. for 9 merker. Kvantumrabatt.

## En n-ro 6

ni informos pri la multaj eksterlandaj revuoj abonindaj.